


**INTERNACIA  
PEDAGOGIA REVUO**

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

**Redaktoro:**

Jozefo Németh

**Vicedaktoro:**

Katalin Kováts

**Kunlaborantoj:**

Mauro La Torre

Stefan MacGill

Bill Maxey

Blazio Vaha



## ENHAVO

Maŭro LA TORRE: <i>Relanĉi la instruadon</i> .....	1
<i>Ekonomia efiko de la Aŭstralia Somerkursaro...</i> (Alan MENDELAWITZ).....	5
Allan SIMON: <i>La komerco kiu povas ŝanĝi la mondon</i> .....	9
Dmitrio LYTOV: <i>Socioniko – talentoj kaj rilatoj</i> .....	11
<i>Ni funebras</i> (☩Charlotte Irwin Kohrs, ☩Raymond Gonin).....	18
<i>Intervjuo kun Boris Kolker</i> (Katalin KOVÁTS).....	20
<i>El la landoj kaj sekcioj</i> (AL, CN, FI, HU, DE-AM, CH, US).....	23
Pri E-instruiloj: <i>Esperanto ABC de Rommesmo</i> (recenzo de B. VAHA).....	30
Lerniloteko: <i>Kiel mi veturu al Tromso?</i> (aŭtoro: Katalin KOVÁTS).....	33
Por via notlibro: <i>La Fondaĵo Saliko restariĝas virtuale; Anoncoj</i> .....	35

## ESTRARO DE LA LIGO

**Prezidanto:** Maŭro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Tel. (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673. <m.latorre@uniroma3.it>; <http://il.uniroma3.it>  
*Kunordigado, rilatoj kun E-organizo.*

**Vicprezidanto:** Stefan MacGill, Bethlen Gábor u. 2, HU-2030 Érd, Hungario. Tel. (+36 23) 364 198. <stefan.macgill@galamb.net>  
*Eldona agado (inkl. periodaĵojn).*

**Sekretario:** Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas v6, SE-641 37 Katrineholm, Svedio. Tel. (+46 150)52387 kaj (+46)708152387 (mesaĝoj). <agneta.emmanuelsson@liberal.se>  
*Membraro, sekcioj, komitato.*

**Vicsekretario:** Sabine Trenner, Ruppinstrasse 8, DE-14770 Brandenburg / Havel, Germanio. Tel. (+49 3381) 794312. <trine@snafu.de>  
*Rilatoj kun lernejoj, trejnado, junularaj aranĝoj.*

**Estrarano pri financoj:** Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge. Tel./fakso: (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>

**Estrarano:** Radojica Petrović, Bul. oslobođenja 36/14, YU-32000 Ĉaĉak, Jugoslavio. Tel. (+381) 32 371053, (oficeja) (+381 32) 302738. Fakso: (+381 32) 342101 <radp@ptt.yu>  
*Lerneĵaj projektoj, universitata agado.*

## RELANĈI LA INSTRUADON

Ĉi-jare ni ne internacie konferencis, sed ni intense partoprenis la Universalan Kongreson en Fortaleza (Brazilo, 2002.08.03-10), aranĝante kaj kontribuante multajn programerojn, kiel la ILEI-Budon, la internaciajn ILEI/UEA-Ekzamenojn, la ILEI-Kunsidon, la UEA-Subkomitaton pri Instruado/Edukado, kaj plej grave la seshoran **TAGO DE LA LERNEJO**, kiu vekis rimarkindan atenton ĉe la kongresanoj, grandparte el la amerika kontinento, kie porinstruaj organizaĵoj ankoraŭ adoleskas aŭ eĉ naskotas.

En la "Tago" oni prezentis spertojn pri lerneja instruado de Esperanto, cele al interkultura edukado, porpaca edukado, "sin-teza" lernado, partopreno en la Eŭroskola tago de la Eŭropa Parlamento. Tagmeze estis prezentataj tradiciaj kaj novspecaj lerniloj, ekde libraj, lumdiskaj, radiaj, kaj televidaj kursoj, ĝis kvar diverstipaj interretaj medioj por lerni la internacian lingvon. Kiel eksterlerneĵaj spertoj oni raportis pri Projekto "Lingvo de Espero" instrue al Afganaj kaj Palestinaj militrifugiintoj. Apartan atenton oni dediĉis al la Brazila

instru-sistemo kaj al la ILEI/UEA-sistemo de Internaciaj Ekzamenoj. Fine rondtable oni revuis la situacion de E-instruado en Ameriko, fare de reprezentantoj el Brazilo, Venezuelo, Paragvajo, Kubo, Haitio, Nikaragvo, Meksikujo kaj Usono. Bedaŭrinde, manke de nia kutima konferenco, ni ne povis tradicie kunvoki nian Komitaton, nek nia estraro povis plenkunsidi. Aliflanke, ĝuste la silento, kaŭzita de tiu manko de oficialaj renkontiĝoj, sentigas al ni pli fortan bezonon objekte kaj kritike rekonsideri nian rolon en la movado, niajn celojn kaj (mal)plenumojn.

En la Strategia Laborplano de Universala Esperanto-Asocio ni vidas 3 ĉefajn kampojn: **informado, instruado, aplikado** (utiligado).

Temas kvazaŭ pri la konstruo de 3-etaĝa domo, kie ĉiu etaĝo apogigās sur la antaŭaj.

Alivorte, proponante la internacian lingvon E-o por nova lingva ordo en la mondo, ni devas – unue diskonigi ĝian ekziston kaj meritojn;  
– due lernigi ĝin plej efike;  
– trie disvastigi ĝian uzadon.



En tiu kadro ĉiuj E-movadaj organizoj, kiuj okupiĝas pri **instruado** (internaciaj kursejoj, E-kulturaj centroj, naciaj E-institutoj, interretaj E-kursoj, respondeculoj pri edukado en la Landaj Asocioj de UEA, fakdelegitoj pri instruado, Landaj Sekcioj de ILEI, Internacia Ekzamena Komisiono) havas grandegan respondecon.

Aparte centran kaj pintan respondecon havas *ILEI* – asocio de la instruistoj kaj instruantoj –, kiu, ankaŭ nome de UEA, devus kunordigi la tutan instruon kaj edukon kampon.

Tiu kampo estas vasta kaj niaj rimedoj estas ankoraŭ ne adekvataj je la defio.

Tamen – se ni kapablos organizi nin celkongrue kaj realisme, rilate niajn bazajn celojn – ni povos postuli de la tuta movado subtenon moralan kaj materian.

Por fari tion, ni devas klare difini niajn **antaŭecojn** (prioritatojn), la plej oportunajn agmanierojn, la bezonatajn rimedojn, la kontrolotajn rezultojn atingendajn.

Kiuj estu niaj prioritatoj?

## 1. LANDA REORGANIZIĜO

Nia plej urĝa ena bezono estas reorganizi niajn strukturojn je

landa skalo. Alivorte ni devas **en ĉiu lando kunordigi** (kaj laŭeble **integri**) la laboron de nia Landa Sekcio, kun tiu de la Landa Asocio de UEA, kaj eventuale kun aliaj organizoj (institutoj, kursejoj, kulturejoj, ktp.). En iuj landoj jam troviĝas diversaj kunlaborigindaj organizoj, en kelkaj landoj estas nur parto da ili (ekzemple nur Landa Asocio), en multaj aliaj ankoraŭ nenio aŭ nur bonvolaj uloj.

Ne temas nur pri bonintencaj dezirdeklaroj inter la ekzistantaj organoj kaj estroj, sed pri tre konkreta **kolektado** de adresoj, **kontaktado** kun la agemuloj, kaj **publikigo** de la utilaj informoj kaj dokumentoj, en retpaĝoj kaj paperaj broŝuroj.

Bela atingo estus se – post kelkaj jaroj – por instruisto sufiĉus membriĝi en sia Landa Asocio, por *aŭtomate* esti ano de la Landa Sekcio de ILEI (kio ie jam delonge okazas).

Por tia kunordiga agado, necesos la strikta kunlaborado ne nur de la respektivaj estraroj de ILEI kaj UEA, sed ankaŭ de la landaraj komisionoj (afrika, amerika, azia, araba, balkana, ...), kie ni devas trovi specifajn respondeculojn pri instruado.

## 2. LERNEJA INSTRUADO

Ĉi tiu estas nia **ĉefa grundo**, kiun ni devas plej bone kultivi, (malgraŭ ke iuj "samideanoj" subtaksas ĝian gravecon kaj volas aliajn antaŭecojn)!

Tiukampe ni menciuj kvar laborvojojn, laŭeble renkontiĝontajn.

2.1 Unue ni bezonas (ree) "**popolnombri**" la lerneajn klasojn en la mondo, kie oni instruas Esperanton. Temas pri popolnombrado, kiu ĉiujare bezonas aktualigon kaj kompletigon, ĉar la infanoj (kaj la instruistoj) nature ĉiam ŝanĝiĝas. Ĝi ne estas nur objektivite scienca statistikumado, sed samtempe ĝi estu **varbado** de novaj klasinstruontoj, kun laŭbezona **kuraĝigo** kaj **helpo** al ili, fare de la ĝenerala E-movado.

2.2 Due ni evoluigu taŭgajn **kunlaborigajn mediojn** por la E-instruantoj kaj la E-lernantoj, kadre de **interkultur-educakaj** celaroj.

Memkompreneble temas unuavice (sed ne ekskluzive) pri: – la papera revueto **JUNA AMIKO**, – la (renovigota) **INTERRETA LERNEJO "TIBOR SEKELJ"**.

2.3 Trie ni konsideru ke interkulture eduki la infanojn (kaj ĝenerale la homojn) per E-o signifas ne nur instrui la lingvon, sed **apliki** ĝin en konkretaj kampoj. Alivorte temas ne nur pri instruado de E-o, sed ankaŭ pri **instruado PER Esperanto**.

Kiom da niaj (ankaŭ emeritaj) instruistoj volonte kunlaborus – ekzemple – en verkado de **element-fakaj lernolibroj** pri geografio, historio, socisciencaj, natursciencaj, ... (per E-o)? Mi kredas ke multaj; ni bezonas nur trovi kapablan kunordigonton de tia valora kaj kontentiga agado!

2.4 Kvare ni **eksteren diskonigu** niajn atingojn ankaŭ en la nacilingvaj lernejaraj kaj instru-sciencaj medioj (fakkonferencoj, periodaĵoj, retejoj), kun aparta atento je medioj, kies celoj jam konverĝas kun la niaj.

Mi pensas pri la multaj **lernejaj projektoj**, kiuj havas interkulturajn kaj porpacajn celojn, ofte kadre de **Unesko-ligitaj lernejaroj**, Unesko-Klubo, k.s.

Novan atenton meritas la movadoj nun okupiĝantaj pri **tutmondecakaj** problemaroj renkontiĝantaj en la t.n. Sociaj Forumoj, kiuj "batalas" por pli justaj mondaj aranĝoj.



### 3. UNIVERSITATA INSTRUADO

Kvankam tradicie tio ne estas nia ĉefa labortereno, ja temas pri (triagrada) instruado pri (kaj per) Esperanto, kaj sekve ni havas moralan respondecon ankaŭ pri tio.

3.1 Unue temas pri popol-nombrado kaj detala priskribado de la kondiĉoj de **Esperanto-instruado** kaj **pri-Esperanta esplorado** je universitata nivelo. Jam ni havas ĉi-kampe kelkajn glorajn ekzemplojn, kiel tiuj de G. Pirlot kaj E. Symoens, kiuj meritas almenaŭ aktualigon kaj re-publikigon.

3.2 Due indas kunordigi la multajn spertojn pri uzado de **Esperanto por universitat-nivela studado** (vidu ekzemple la iniciatojn de AIS, sed ankaŭ de pluraj kulturcentroj kaj seminarioj).

La supre skribitaj tri kampoj (landa reorganizigo, lerneja instruado, universitata instruado) estu niaj **antaŭecoj!**

Tio ne signifas ke ni ne havu aliajn agadojn (recenzado de lerniloj, aranĝado de konferencoj,

eldonado de periodaĵoj, diskutado pri profesiaj problemoj kaj trejnado de instruantoj, ekstera rilatado). Tamen ĉi-lastaj jam iom farataj agadoj estus senutilaj sen la plisupre menciitaj antaŭaĵoj.

Jam ekde la aŭgustaj semajnoj ni en la estraro ekpriplanas la suprajn agadojn. Tiu planado evidente koncernas la laboron ne nur estraran, sed la kunlaboron kun (espereble) multaj aliaj **komisiitoj** kaj **helpantoj** pri la diversaj kampoj.

Se vi aŭ konato via volos kunlabori kun ni en la planado kaj plenumado de io el la direktajoj, vi/si/li **TRE BONVENOS**. Anoncu vin!!

Ankaŭ konstruemaj kritikoj en IPR kaj/aŭ en la diskutgrupo [E-INS] povos helpi. Dankon!

*Maŭro La Torre*



## EKONOMIA EFIKO DE LA AŬSTRALIA SOMERKURSARO DE ESPERANTO EN PERTH (PERTO) 2002

### LA AŬTOROJ

Ĉi tiu studo de la ekonomia efiko sur Okcident-aŭstralion de la 2002 Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto estis planita de S-ino Margaret O'NEILL, de De Vos O'Neill Research and Evaluation, kaj S-ro Alan MENDELAWITZ, de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio (ELWA). Esperantaj versioj de la enketilo kaj ĉi tiu raporto estis verkitaj de S-ro Mendelawitz.

### ANTAŬPAROLO

Ĉi tiu projekto celis montri la ekonomian efikon de la 2002 Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto sur Okcident-aŭstralion. La sociaj avantaĝoj de la Esperanta Somerkursaro estas jam bone konataj. Ĉi tiu esplorado estis farita por kalkuli la ekonomian avantaĝon, esperante ke tia evidentaĵo montrus al la Ŝtata registaro, lokaj instancoj, turismaj organizoj kaj komerco la finanĉan valoron de pli da subtenado por similaj Esperantaj eventoj.

La rezultoj eble interesus aliajn Esperantajn organizojn kaj edukistojn kiuj prilaboras lingvan edukadon je ĉiuj niveloj.

### LA EKONOMIA EFIKO

Kelkaj rilataj komentoj pri la ekonomia efiko de apartaj eventoj:

Rekta Efiko estas la unua elspezado kiu okazas kiel "nova mono" en regiono. La efiko de la unua elspezado estas multiplikata dum la mono estas ree elspezata en la komunumo.

Nerekta Efiko estas la plivastigita ekonomia agado, kiu helpas tiujn firmaojn, kiuj provizas mezajn varojn kaj servojn al tiuj negocoj, kiuj rekte provizas varojn kaj servojn al la evento.



Instigita Efiko estas la plivastigita ekonomia agado generata de dungantoj kiuj elspezas monon gajnitan de tiuj negocoj kiuj kreas la rektan kaj nerektan efikojn.

### TUTA EKONOMIA EFIKO

Sekvantaj serioj de elspezado (t.e. la nereкта kaj instigita efiko) estas kalkulataj uzante "multiplikanton" (angle: multiplier), ilo kiu estas evoluigita per enmetado-elmetadaj studoj, kiuj sekvas la elspezadon. Ĉiokaze, la multiplikanto 0.598 estis uzata.

La tuta ekonomia efiko de la Somerkursaro sur Okcident-aŭstralion estis kalkulita je \$73.000.

### METODO

La elspezaj kutimoj de aliŝtataj kaj eksterlandaj vizitantoj al la Somerkursaro estis determinitaj per enketilo, kiun oni disponigis kaj en la angla kaj en Esperanto. La enketilo, kun instrukcioj kiel plenigi ĝin, estis inkluzivita kun la registraj dokumentoj de ĉiu vizitanto. Kursaj ĝeinstruistoj emfazis la gravecon de tiu ĉi studo kaj, de tempo al tempo, rememorigis la partoprenantojn pri registrado de ĉiuj eroj de elspezo. Enketiloj estis kolektitaj je la fino de la Somerkursaro. Demandoj pri la enketilo estis responditaj de enketisto ĉeestanta dum la Somerkursaro.

La sampla konsistis el 27 homoj: 12 viraj kaj 15 virinaj.

### RESUMO DE REZULTOJ

#### Demografia informo pri partoprenantoj

##### Aĝo

Ĉiuj krom du vizitantoj aĝis 45 jarojn aŭ plie, kio estas kutima ĉe Aŭstraliaj Somerkursaroj. Du personoj estis en la 25-44 jaraĝa grupo, 12 estis en la 45-64 jaraĝa grupo, dum 13 havis pli ol 65 jarojn. Estis 24 aliŝtataj vizitantoj kaj 3 eksterlandaj.

### Longo de Restado

La averaĝa restado en Okcident-aŭstralio estis 17 tagojn longa.

Entute, vizitantoj restis dum 30 ekstraj tagoj en Okcident-aŭstralio, aldone al la periodo de la Somerkursaro.

### Vojaĝada historio kaj kialoj por vojaĝado

Krom 2 personoj, ĉiuj ĉefe vizitis Okcident-aŭstralion por ĉeesti la Somerkursaron.

3 personoj partoprenis sian unuan Somerkursaron.

5 personoj unuafoje vojaĝis ĉefe pro kialoj rilataj al Esperanto.

9 personoj antaŭe vojaĝis en siaj propraj landoj pro kialoj rilataj al Esperanto.

11 personoj antaŭe vojaĝis kaj en siaj propraj landoj kaj eksterlande pro kialoj rilataj al Esperanto.

1 persono vojaĝis nur eksterlande pro kialoj rilataj al Esperanto.

Ĉiuj personoj volonte denove vojaĝus pro kialoj rilataj al Esperanto.

### Elspezo

Partoprenantoj elspezis averaĝe po \$1.691 dum sia restado en Okcident-aŭstralio. Loĝado kostis averaĝe po \$669, manĝoj po \$481, kursaj elspezoj po \$207, ekskursoj po \$84, transportado po \$83, kaj butikumado po \$54. La averaĝa elspezo por distraĵoj estis po \$37, personaj servoj po \$16, kaj Esperantaj libroj po \$18. „Aliaj” elspezoj estis po \$43.

La sumo menciita por aĉetado de Esperantaj libroj reprezentas la porcion kiun Okcident-aŭstralio rajtis gajni.

Sumoj estis esprimitaj kiel la plej proksima dolaro, kio rezultas en proksimumaj fin-sumoj.

### DISKUTADO

La Somerkursaro estis organizita de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio kunlabore kun la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Kiel antaŭe notita, la plimulto de la vizitantoj havis pli ol 45 jarojn. Inter la partoprenantoj estis kelkaj kiuj havis pli ol 70 jarojn. Estas jam konate ke iuj pli junaj personoj ne povis ĉeesti pro familiaj respondecoj kaj/aŭ manko de mono. La Somerkursaro estis planita precipe por plenkreskulaj studentoj kaj ne estis reklamita al infanoj (kvin Okcident-aŭstraliaj infanoj ĉeestis, akompanite de siaj gepatroj). Plua enketo pri aĝaj grupoj estus inda.



Kutime Aŭstraliaj Somerkursaroj allogas pli grandajn nombrojn de eksterlandaj vizitantoj ol je ĉi tiu okazo. La Perta Somerkursaro estis reklamita per la Interreto al pli ol 100 landoj, kaj multaj esprimoj de interesiĝo kaj bondeziroj estis ricevitaj. Tamen, la atakoj kontraŭ Usono la 11an de septembro, 2001, malfavore efikis sur la nombron de homoj kiuj estis volontaj vojaĝi al Aŭstralio en ĉi tiu tempo. Nuntempa maltrankviliĝo pri la sekureco de flugado eble malgrandigis ankaŭ la nombron de aliŝtataj partoprenantoj. Unu vjetnama kaj du ĉinaj esperantistoj, kiuj jam estis pagintaj siajn aliĝkostojn, sekve ne ricevis aŭstraliajn vizojn.

La averaĝa longo de restado en Okcident-aŭstralio estis 17 tagoj, kio estis 3 tagoj pli ol la longo de la kursaro. Iuj vizitantoj vizitis lokojn ekster Perto. Personoj eble estus persvaditaj plilongigi siajn vojaĝojn per allogaj "inkluzivaj" turismaj aranĝoj (angle: packages).

Negocoj povus proponi al vizitantoj lokajn varojn kaj servojn rabatpreze; tiaj proponoj ricevus publikan agnoskon. Oni povus proponi varojn de aparta Okcident-aŭstralia karaktero ĉe la Somerkursara loko; ĉi tio helpus ĉar la horoj de studado ofte malhelpas longajn butikumcelajn veturojn.

Oni plendis pri la maloportuneco kaj malakurateco de la publika aŭtobusa servo; iuj ekskursoj estis nuligitaj kaj personoj ne vizitis la urbon tiel ofte kiel ili farintus se la transportado estus pli oportuna. Senpaga publika transportado inter la urbo kaj la kursejo por Somerkursaraj vizitantoj, kion la organizantoj nesukcese petis ĉi-jare, estus senkosta publika reklamo por Perto kaj helpus komercon. Ĉi tia aranĝo estis favore rigardata en aliaj landoj.

"The West Australian" ("La Okcident-aŭstraliano"), la unusola ŝtate bazata ĉiutaga ĵurnalo, presis allogan foton pri Somerkursaraj partoprenantoj kun akompana artikolo. Multaj homoj, aparte la junaj, unue estus eksciintaj pri Esperanto per la artikolo.

La Urbestro de Perto, D-ro Peter Nattrass (pron.: Piter Netres), oficiale malfermis la Somerkursaron. Post kelkaj tagoj li gastigis aron de esperantistaj vizitantoj kaj loĝantoj ĉe la urbo-konsiliaj ĉambroj kaj tiam prezentis al ELWA ŝildon kiel memorigaĵon pri la okazo.

La organizantoj kredas ke la diskonigo de la Somerkursaro plifortigis la argumentaron por Esperanto kiel LOTE (Language Other Than English – lingvo alia ol la angla) instruota en ŝtataj lernejoj: ĉi tio estas elkora celo de lokaj esperantistoj. La organizantoj ankaŭ esperas ke estos pli da konscio pri Esperanto ĉe registaraj instancoj, lokaj instancoj, turismaj organizoj kaj komerco.

Pli bona agnosko de Esperanto, oni esperas, kondukas al pli da involviĝo en interkulturaj, multkulturaj kaj komunumaj eventoj.

Dum la kvanto da mono, kiun vizitantoj elspezas, varias de ŝtato al ŝtato, kaj ankaŭ la maniero per kiu la mono fluas tra la ekonomio varias, ĉi tiu studo provizas indikon pri la grado de efiko kiun oni atendus, kaj provizas iujn sugestojn por plibonigi tiun efikon.

Esperable, la rezultoj de ĉi tiu studo helpas la planadon de estontecaj Somerkursaroj de Esperanto en Aŭstralio.

## AGNOSKOJ

Ege dankindaj estas ĉiuj partoprenantoj kiuj respondis al la enketo, la instruistoj kiuj kuraĝigis partoprenantojn respondi, kaj komitatanoj de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio pro la helpo.

\*\*\*

## Allan Simon: La komerco kiu povas ŝanĝi la mondon

Mi unuafoje renkontis David Yaki [en la foto] en 1998. Ĉar mi estis UEA-delegito en Calgary (Kanado), li petis mian helpon: li volis enkonduki vesperajn esperanto-kursojn en la lokan universitaton sed mankis al li la lingva kaj instrua spertoj. Jam tiam mi miris pri tiu nekutima viro. Proksimume 40-jaraĝa, li estis plentempa studento en la inĝeniera fako. Li kaj lia edzino havas tri junajn infanojn, kaj ili zorgas ankaŭ pri du aliaj. Tamen, ĉiun matenon David





ellitiĝis je la kvina por liveri ĵurnalojn pordalporde; tiel li sukcesis finance vivteni sian familion. Antaŭe, li estis sukcesa vendisto kaj vendestro de la fama "Enciklopedio Britannica" sed tiu firmao ja estis ferminta siajn pordojn.

Nu, nia sperto en 1998 estis duone sukcesa: David varbis studentojn, trovis taŭgajn senpagajn klasĉambrojn, ktp. kaj mi instruis, ankaŭ senpage. Evidentiĝis la fenomenoj kiujn sendube spertis e-instruistoj alikoke: proksimume la duono de la studentoj forlasis la kurson; la aliaj malaperis post la komencaj dek lecionoj.

Poste, malaperis ankaŭ David: li akceptis postenon kiel inĝeniera "internulo" en Svislando. Profitante de la deĵoro li perfektigis sian lingvoscion ĉe la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds kaj vojaĝis tra Eŭropo per helpo de la Pasporta Servo.

Pasintan jaron David reaperis en Calgary. Li sugestis denove kurson por komencantoj. Mi protestis: Ĉi-foje, mi faros tiun laboron nur kontraŭ sufiĉa pago. Plue, mi argumentis, la studentoj aprezus lecionaron kiel ion valoran nur se ili pagas kotizon – ni ja vidis ke senpagajn kursojn oni taksas kiel ion senvaloran kiun oni forlasas kiam mankas tempo. David konsentis kaj tuje elmontris siajn rimarkindajn energiojn kaj kapablojn. Li rekrutis dekkvar studentojn kiuj pagis po \$300 por dekkvinleciona enkonduko, kaj li montris al mi kvar-paĝan liston de aliaj homoj kiuj volus sekvi tian kurson. Uzante la saman profesiajn vendo-teknikojn kiujn li lernis ĉe Enciklopedio Britannica, li pruvis al si kaj al mi ke fakte ekzistas vasta merkato por profesia esperanto-instruado.

En aprilo 2002 David diplomiĝis. Li decidis starigi la firmaon "Esperanto Antaŭen", kiu malfermis siajn pordojn la 29-an de majo 2002. David firme kredas ke bona plentempa vendisto kiu uzos profesiajn teknikojn vendos minimume 200 kursojn jare. Laŭnecese oni dungos instruistojn kaj vendistojn. Post tri jaroj la enspezoj estos pli ol \$250,000 jare! Post kiam la lernejo en Calgary glate funkcios, David intencas starigi similajn centrojn en aliaj urboj tutmonde. Li ne dubas ke tiamaniere esperanto disvastiĝos je ĝis nun neimagebla skalo; li kaj la aliaj akcio-posedantoj rikoltos konsiderindan financan rekompencan.

Ĉio ĉi eble ŝajnas utopia revo de nerealista fantaziulo. Ankaŭ mi kredis tion ĝis mi pli bone konis tiun eksterordinaran viron. Nun mi ne dubas ke Esperanto Antaŭen estas valida enterpreno kiu meritas subtenon, ne nur

pro poresperantaj kialoj sed ankaŭ pro sia financa evolu-eblecoprognozo. Homoj kiuj deziras pliajn informojn (ekzemple pri investado aŭ por postuli laboron) turnu sin al David je la sekvaj adresoj: *David Yaki, 80 McHugh Court N.E. Calgary, Alberta T2E 7S1 Canada. Tel. 403-277-3884, david.yaki@esperanto-antauen.com.*

*Allan Simon, Calgary, Kanado*

## **Dmitrio Lytov: Socioniko – talentoj kaj rilatoj**

*(Sankt-Peterburgo, 28 julio 2002)*

### **Socioniko kaj problemoj de pedagogio**

Socioniko estas psikologia teorio, kiu iĝis fama en landoj de la estinta Soveta Unio dum la lastaj 20 jaroj, kaj nun disvastiĝas tutmonde. Ĝiaj adeptoj opinias, ke rilatoj inter homoj kaj denaskaj talentoj de homoj estas reciproke interligataj, kaj se oni komprenas talentojn de iu homo – oni povas prognozi liajn rilatojn kun aliuloj.

Ankoraŭ en 1920-aj jaroj svisa psikiatro C.G.Jung kreis la teorion de personaj tipoj sur la supozo, ke iuj denaskaj trajtoj ne povas esti simile fortaj: naturo kvazaŭ elektas, aŭ – aŭ. Poste sur la bazo de lia teorio kelkaj aŭtoroj – Eysenck, Meyers-Briggs, Keirsej ktp. – kreis psikologiajn testojn, kiuj iĝis famaj. Bedaŭrinde, la menciitaj aŭtoroj preskaŭ ignoris la problemon de rilatoj inter tipoj.

Estas mirinde, ke kutime en psikologio oni rigardis personajn tipojn kaj rilatojn kiel tute ne interligitajn tute sendependajn fenomenojn. Eĉ plu, en la sovieta psikologio oni ofte ignoris mem la estadon de denaskaj kapabloj: laŭ leninista filozofio, «homo estas la produktaĵo de socio».

En 1970 litova sociologino Auŝra Augustinavičiute verkis kelkajn artikolojn, en kiuj ŝi penis pruvi, ke personaj tipoj, eltrovitaj de Jung, estis la ŝlosilo al rilatoj inter homoj. Ŝia teorio nomiĝas "socioniko": «socio» + «-oniko», kiel en «bioniko» (biologia modelado) – la teorio de modelado de sociaj rilatoj kaj konduto.

Kial socioniko estas tiel populara en la teritorio de la estinta Sovietunio? Tio estas ne hazardo, sed logika rezulto. Tro longe la sovieta potenco ignoris la Personecon (dum 1930-1950 jaroj mem la psikologio estis malpermesata) – tial nuntempe la intereso al pedagogiaj kaj psikologiaj problemoj estas grandega kaj kreskanta.



Multaj *socionikistoj* (tiel nomiĝas adeptoj de socioniko) laboras en infana kaj lerneja psikologio, profesia kaj familia konsultado. En ĉi tiu malgranda artikolo mi klopodas rakonti pri tio, kiel socioniko helpas solvi problemojn de klerigo, eduko kaj interpersonaj rilatoj.

### Tipoj kaj instruado

Ekde la jaro 1991 Jekaterina Filatova, socionikistino el Rusio, kolektadas fotoportretojn de homoj, kies tipojn ŝi testis. Nuntempe ŝia kolektaĵo enhavas pli ol 600 fotojn. Dume ŝi malkovris interesan fenomenon – multaj «samtipuloj» ofte aspektas kvazaŭ ĝemeloj, kvankam ili eĉ ne estas parencoj. Evidente, la persona tipo estas “antaŭprogramita” denaske.

Tio estas tre grava fakto. Tio signifas, ke ŝancoj “refari”, “reeduki” homon estas limigitaj. Bedaŭrinde, sufiĉe ofte ni konas situaciojn, kiam oni penas “refari” sian partneron, t.e. ignoras sian personecon – eĉ en lernejoj. “Vi ne *ne povas*, vi simple *ne volas* kompreni!” - ofte povas aŭdi lernanto de sia instruisto, infano de siaj gepatroj. Tamen ĉu vere nur “ne volas”? Por ke mi klarigu al vi la kaŭzojn de malkompreno, mi devas rakonti pri socionikaj tipoj de personeco. Entute estas 16 tipoj. En la Tabelo 1 oni vidu «formulojn» de la tipoj kaj fotoportretojn de la plej distingaj reprezentantoj de ĉiu tipo.

Modernaj medicinaj esploroj pruvis, ke indicoj de la 16 socionikaj tipoj (tiel nomataj «intuicio», «senso» ktp.) havas malambiguajn kongruaĵojn en la strukturo de cerbo (kaj tio estas ankaŭ grava pruvo de tio, ke persona tipo estas denaska – ne efemera – aĵo). Tamen, komunikante kun iu ajn homo, ni certe ne povas sekci lian kranion kaj pririgardi cerbon.

Tamen ni povas juĝi pri lia tipo dank’ al eksteraj riveloj, kies aron oni kutime nomas “homa karaktero”. La psikologo el Kievo (Ukrainio) Viktor Gulenko disigis homan karakteron je du komponantoj.

La unuan parton li nomis *agastrebo*. Laŭ sia *agastrebo*, oni povas esti *logikulo* (pritaksanta eventojn objekte, kvazaŭ «deflanke») aŭ *etikulo* (pritaksanta situaciojn de vidpunkto de personaj ecoj de homoj), *intuiciulo* (kun dominanta abstrakta penso, imago, kio ofte riveligis per distriĝeco) aŭ *sensulo* (kun konstante aktiva atento, sensumoj, konkreta penso).

La duan parton li nomis *temperamento*. Laŭ sia temperamento oni povas esti *ekstravertulo* (ema al plilarĝigo de sia agemo) aŭ *introvertulo* (ema al

stabiligo, harmoniigo), *raciulo* (kun fortaj «juĝantaj» sektoroj de cerbo) aŭ *malraciulo* (kun aktivaj «perceptantaj» sektoroj de cerbo).

La temperamento estas sufiĉe fajna kaj fleksema parto de karaktero, tial priskribi ĝin en kelkaj paĝoj estas nefacila tasko. Tamen *agastreboj* estas tre bone okulfrapantaj dum komunikado. Sufiĉe ofte malkompreno inter instruisto kaj lernanto, gepatroj kaj infanoj rezultiĝas ĝuste el diversaj *agastreboj*. Entute estas kvar *agastreboj* (vidu Tabelo 1).

*Esploruloj*. Oni temas pri homoj, kiuj ofte havas fortan analizan penson kaj riĉan imagon. Iliaj interesaj estas diversaj, ofte ili havigas eĉ «troajn» konojn, kiuj, eblas esti, taŭgos poste. Ili multe pensas kaj ofte faras nekutimajn decidojn. La malforta eco de “*esploruloj*” – al ili ofte mankas takteco en rilatoj kun aliuloj. Ofte okazas, ke ili faras bonegan decidon (solvon), sed havas problemojn pri ĝia praktika realigo.

*Humanuloj*. Tio estas uloj, kies imago direktiĝas al mondo de homoj kaj rilatoj inter ili. Ilia kutima talento estas: inspiri aŭ kvietigi, trovi ŝlosilon al homo kaj liaj eblecoj. Ilia kutima malforta eco estas emocioj, pasioj, kiuj ofte malhelpas al ili vivi trankvile. Tre multajn problemojn ili prenas en kore, tial stresoj kaj nervaj krizoj estas al ili sufiĉe minacaj.

*Sociuloj*. Necesoj de homo, lia vivo, ĝuo, materia mondo – jen kio interesas ilin. Ilia realismo, scipovo interkonsenti kaj impresigi ofte garantias al ili sukceson... kaj atenton de mala sekso. Ilia kutima malforta eco estas neantaŭvidemo, vivo “ĉi tie kaj nun”, manko de sobra skeptikismo. Ili ofte supertaksas sian eblecon interkonsenti kun homo kaj influi lin, anstataŭ krei objektivan rezulton. Ekzemple, se instruisto donis malbonan noton al lernanto-*sociulo*, lia unua penso estos ne “mi ne lernis sufiĉe”, sed “la instruisto malbone traktas min”.

*Praktikuloj*. Tiuj homoj taksas ĉion de vidpunkto de praktika rezulto, ne ŝatas “fantaziaĵon” kaj “vanan babladon”. Ilia maniero de komunikado en la proksima distanco estas kutime sufiĉe bruska, senceremonia – se la partnero ne “respektigis sin”. Ofte reprezentantoj de ĉi tiuj tipoj okupas estrajn postenojn, kaj volonte taskas al aliuloj tion, kion ili ne ŝatas – perspektivan planadon, analizon kaj precipe intertraktojn (*praktikuloj* ne ŝatas persvadi – al ili estas pli facile insisti en iliaj opinioj). Ilia problemoj



estas la kutimo al “provitaj vojoj”, kaj ili tre ne ŝatas netradiciajn solvojn, neceson lerni novajn konojn.

El la priskriboj oni vidas, ke persona tipo interligas kun homaj kapabloj al certa okupo. Bedaŭrinde, oni ne ĉiam laboras laŭ siaj kapabloj. Iufoje gepatroj elektas al sia infano “prestigan” profesion. Iufoje (tiel ankaŭ okazas) postulo al ies denaskaj talentoj povas esti malgranda, kaj oni devas trovi alian, ne “denaskan” okupon. Tamen la vivo ŝanĝiĝas, kaj oni povas trovi ŝancon ŝanĝi sian misan decidon.

Krome, la diferenco de agastreboj ofte rezultigas malkomprenon. Tiaj okazoj estas bone konataj en la pedagogia praktiko. Kio okazas, se instruisto estas “*praktikulo*”, sed plimulto de la lernantoj estas “*esploruloj*”? Evidente, komence al lernantoj povas plaĉi lia ekzaktecio, lakoneco, detaleco; tamen poste, iom post iom, ili povas protesti kontraŭ “ŝabloneco”, monotoneco, tro “laŭstandarda” penso de la instruisto. Kion fari? Spertaj pedagogoj kutime konsideras en sia laboro interpresonajn diferencojn, sed malspertulo povas tentiĝi “refari”, “reeduki” lernantojn, kaj eĉ puni ilin pro “ne tia” penso, pro tio, ke ili “ne volas” kompreni iliajn pli bonajn strebojn. Tio estas senelira vojo.

Nun, kiam vi konatiĝis kun diferencoj inter 16 tipoj – ni rakontos, sur kio baziĝas la rilatoj inter ili.

## Rilatoj

Kaŭze de la amplekso de la artikolo ni ne povos priskribi ĉi tie la rilatojn de ĉiu tipo kun ĉiu, sed rigardos la tiel nomatajn simplajn ecojn de rilatoj. Entute estas kvar ecoj: *helpo*, *konflikto*, *direkto* kaj *kompreno*.

La simboloj estas klarigataj en la Tabelo 1.

△ L ●	▲ L ○	□ L L	■ L L
-------	-------	-------	-------

1. *Helpo*. Tio estas kvazaŭ kompletigo de malfortaj ecoj de unu partnero per fortaj ecoj de alia. Ofte eksteruloj miras: “Kio kunigas ĉi tiujn homojn, ja ili estas tiel diversaj!”. Tamen reciproka kompreno en tiaj rilatoj estas ne sufiĉa: kiam al unu “ĉio estas jam komprenita”, alia bezonas pli kaj pli da pruvoj.

△ L ○	▲ L ●	□ L L	■ L L
-------	-------	-------	-------

2. *Konflikto*. Se ni rimarkas, ke du personoj estas konektitaj per tiaj rilatoj – tio signifas, ke almenaŭ unu de ili havas seriozan vivan krizon

(ekzemple, li ne kapablas solvi certajn vivajn problemojn). Interŝanĝo de informoj en tiaj rilatoj estas ofte neefika – kion diras unu, al la alia estas ne ĉiam plezure aŭdi, kaj li ignoras la diritaĵojn. Ankaŭ en la edukado kaj klerigo tia tipo de rilatoj rezultigas multajn problemojn.

△ L ▲	○ L ●	□ L ■	□ L L
-------	-------	-------	-------

3. *Direkto*. Partneroj ofte penas atentigi unu la alian pri “malgravaĵo”, “detalaĵo”, kiun li malatentis; ne tiel kompreni, kiel “korektigi kaj plenigi” la aŭditan informon. Diskutoj iufoje estas “tempestaj”, sed ofte senrezultaj – la partneroj laciĝas. En tiaj rilatoj partneroj ofte estas malegalaj, aŭ simple apartenas al diversaj grupoj. Pri instruado tiaj rilatoj bonas nur tiam, kiam lernanto “entute” jam prenis multe da informoj – oni bezonas nur plibonigi, precizigi ilin. Aliokaze lernanto simple ignoras tion, kion li aŭdas de la instruisto.

4. *Kompreno*. Tio estas interago de identaj funkcioj (ekzemple ▲ – ▲). En tiaj rilatoj partneroj tre bone povas instrui unu la alian, precipe se la kona nivelo de unu estas pli alta ol la nivelo de la alia. En komunaj faroj partneroj komprenas unu la alian senforte. Sed en tiuj rilatoj eblas almenaŭ du problemoj. Unue, ili ambaŭ estas malfortaj antaŭ la samaj problemoj, t.e. se ambaŭ partneroj estas sufiĉe malspertaj, tiam ilia reciproka helpo povas esti neefika. Due, komuneco de intereso povas rezultigi en konkurenco.

Krom la menciitaj ecoj, certe, ekzistas aliaj faktoroj, kiuj influas la rilatojn. Ekzemple, se unu partnero estas *raciulo*, kaj la alia – *malraciulo*, do tre verŝajne iliaj “vivaj ritmoj” ne kongruas. Kion unu de ili faras rapide, la alia faras malrapide; pri kio unu atentigas multajn detalaĵojn, la alia komprenas ĉion “entute”. Tio malfaciligas la komunikadon. Tamen samtempe, por tiaj partneroj estas facile distribui respondecojn inter ili dum plenumado de longtempa tasko.

Se instruisto havas problemojn pri siaj kontaktoj kun lernantoj, aŭ se okazas problemoj en lia klaso, do la scio pri intertipaj rilatoj estas la ŝlosilo al la ĝusta solvo.

## Perspektivoj

Nuntempe en la monda pedagogiko ekzistas amaso da problemoj, al kiuj socioniko povas esti ŝlosilo. Ekzemple, scienca-teknika progreso kreas pli



kaj pli da informajon, pro kio lernanto, kiu finis la lernejon, havas nesufiĉe da scioj, por plulerni en altlernejo. Do kio estas la solvo? Plilongigi mezlernejan programon je 2-3 jaroj? Ĉar progreso apenaŭ ĉesos, oni devos plilongigi mezlernejan programon plu kaj plu... Tamen estas ebla ankaŭ alia solvo, kiu sukcese aplikigaŝ en Japanio – jam ekde la frua infaneco “rangigi” infanojn laŭ kapabloj; ne “enŝovi” en iliajn cerbojn amason da informoj, sed doni nur tiun, kiu la plej bone kongruas al iliaj denaskaj talentoj. Ĝuste dank’ al tia solvo Japanio obtenis sian ekonomian sukceson. Se la lando volas vivi prospere, ĝi ne devas ignori problemojn de klerigo kaj eduko.

Ankaŭ interpersonaj rilatoj estas tre grava problemo. Estas konate, ke multaj familioj disfalas kaŭze de “malsimileco de karakteroj”, kio povas, ekzemple, malbone influi la infanojn. Socionikistoj aktive interesiĝas pri tiaj problemoj kaj esploras metodojn de iliaj solvoj. Tial socioniko havas grandan estontecon.

### Socioniko kaj Esperanto

En la jaro 2002 mi, A.Galkin kaj P. Mojajev ekdecidis «esperantigi» socionikon. Tio montriĝis sufiĉe facila tasko (eĉ pli simpla ol traduko en aliajn eŭropajn lingvojn), ĉar esperantaj radikoj kaj sufiksoj tre precize respregulis la esencon de socionikaj terminoj. La logikeco kaj potenco de Esperanto demonstriĝis ĉi tie en sia plena amplekso.

La rezulton oni povas vidi kaj pritaksi en nia multlingva retpaĝo <http://socioniko.hotbox.ru>.

















### En la artikolo estis uzataj materialoj el la sekvaj verkoj:

1. Gulenko V.V. Garantioj de efika instruado (1991).
2. Gulenko V.V., Tyŝĉenko V.P. Jung en lernejo (1996).
3. Filatova Je.S. Personeco en socionika spegulo (2001).
4. Leaver B.L. Instruado de ĉioma klaso (1994).
5. Lytov D.A. Uzo de personeca tipologio pri lernado de fremdaj lingvoj.
6. Ovĉarov A.A. Socioniko – la vojo al personeco. Por laborantoj kun adoleskoj (1996).
7. Ŝepetjko Je. Analizo kaj klasifiko de intertipaj rilatoj.

En la dekstra tabelo estas prezentataj la 16 personaj tipoj: “agastreboj” (horizontale) kaj “temperamentoj” (vertikale).

(Laŭ V.V. Gulenko, 1991; fotoj – Je.S. Filatova, 1991 - 2001.)

Tabelo 1.

	«Kolerikuloj» (raciaj ekstravertuloj)	«Sangvinuloj» (malraciaj ekstravertuloj)	«Flegmuloj» (raciaj introvertuloj)	«Melankoliuloj» (malraciaj introvertuloj)
Esploruloj (intuicio + logiko)				
Humanuloj (intuicio + etiko)				
Sociuloj (senso + etiko)				
Praktikuloj (senso + logiko)				

Kiel legi nomojn de tipoj: 1-a simbolo = -ema, 2-a simbolo = -iva.

La simboloj - rondo, angulo, triangulo, kvadrato - signifas respektive: senso, etiko, intuicio, logiko. Se la unua simbolo estas *blanka*, la tipo estas *introvertulo*, se nigra – *ekstravertulo*. Ekzemple:  $\triangle \blacksquare$  = intuciema-logikiva introvertulo.

**Aŭtoro:** Dmitrio Lytov (*surfote*; nask. 12.07.1974) – lingvisto, tradukisto kaj psikologiisto. Posedas esperanton ekde 1993, sed longe estadis “kaŝita esperantisto”. Publikigis multajn artikolojn. Loĝas en Sankt-Peterburgo, Rusio. Rete: [socion@hotbox.ru](mailto:socion@hotbox.ru).





**Charlotte Irwin Kohrs**, fondinto de "Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo" kaj ĝia Direktoro dum multaj jaroj, mortis la 31-an de julio 2002 ĉe sia hejmo en San-Diego, Kalifornio. Ŝi naskiĝis en 1910 en New Haven, Konekticuto sed pasis plejparton de sia juna vivo en Berkeley, Kalifornio, kie ŝia patro, kiu scipovis dek unu lingvojn, estis Profesoro pri Matematiko en la Universitato de Kalifornio.

Charlotte tre interesiĝis pri la instruado de Esperanto al infanoj post la morto de sia edzo Lewis en 1982. Ŝi verkis "malgrandajn librojn" por infanoj, inkluzive de ABC EN ESPERANTO, LA BELA PLANEDO, DEK DEMANDOJ, DEK FABELOJ, FLUGU KUN PETRO, NI ESPLORU LA MONDON, kaj NI PAROLU ESPERANTE KUNE.

Ŝi komponis dek du konversaciajn kantojn por lernantoj. Ili estis eldonataj en libreto KANTU ESPERANTE kaj estis eldonataj ankaŭ kiel son-kasedo KANTU ESPERANTE KUN JANICO KAJ JOHANO.

Ŝi redaktis, eldonis, kaj distribuis tra la mondo dum kelkaj jaroj novaĵleterojn por "Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo". Pro ŝia granda laboro por Esperanto Charlotte estis nomata "Honora Membro" de la Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko en 1999. Dum siaj lastaj jaroj Charlotte ricevis multe da helpo pri Esperanto-aferoj de Jim Faughnan.

Dum du jaroj Charlotte studis ĉe Mills College, sed poste ŝi diplomiĝis ĉe la Universitato de Viskonsino. Iam ŝi revis pri kariero kiel konĉerta pianisto, sed anstataŭe dum la Granda Depresio ŝi laboris kiel profesia socio-helpisto en Novjork-Urbo. Poste ŝi havis postenojn kiel instruisto de antaŭ-lernejaj infanoj kaj iliaj gepatroj, mez-lerneja instruisto (tiam ŝi kelkfoje instruis tiujn kiuj havas mensajn problemojn), kaj lerneja parol-terapeŭto. Ŝi ofte uzis pupojn por instrui infanojn. Ŝi kreis specialan bildvort-lingvon por helpi infanojn, kiuj havas leg-problemojn. Ŝi ankaŭ verkis libretojn kaj pup-teatraĵojn por infanoj.

Charlotte amis infanojn, naturon, muzikon, kartludojn, kaj vortludojn. Ŝi estis tre optimisma persono kiu opiniis, ke unu persono povas plibonigi la socion kaj la mondon. Ŝi helpis multajn aliulojn, aparte infanojn, dum sia vivo. Ŝiaj specialaj daŭraj donacoj al ni estas ŝiaj libretoj kaj kantoj por instrui Esperanton al infanoj tra la tuta mondo. Tiuj materialoj, kiujn ŝi produktis, haveblos ĉe la nova ret-paĝo por "Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo"

<<http://members.directvinternet.com/~billmania/ICxLM.html>>, kaj post kelkaj semajnoj ĉe la nova adreso <<http://www.ICxLM.org>>.

Kontribuojn por honoro ŝin oni povas doni al la "Fonduso por Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo" ĉe ELNA (P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530) aŭ al "Freedom from Hunger" (1644 DaVinci Ct., Davis CA 95617).

*Ronald Glossop, nova Direktoro de Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo*

Kun malĝojo ni anoncas al vi la forpason de **Raymond Gonin** la 11-an de aprilo 2002. Li naskiĝis la 28-an de decembro 1913 en kampara vilaĝeto de Saône-et-Loire. Li ekstudis en 1923 en la blindullernejo de Villeurbanne kaj pli poste studis tute sola por akiri pli altajn ŝtatajn diplomojn. En 1930, li hazarde trovis brajlan broŝureton «L'Espéranto en dix leçons» de Théophile Cart kaj post eklerno de la lingvo, li ĉeestis dum 1932 sian unuan universalan kongreson en Parizo kiam kreiĝis UABO, t.e. Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj. Poste kreiĝis nova asocio FUBE (Franca Unuiĝo de Blindaj esprantistoj) kaj dum multaj jaroj prezidis la asocion. Li dediĉis multe da tempo por instrui la hispanan lingvon kaj esperanton. En 1974 kvarjaron antaŭ la emeritiĝo, li estis honorigita ricevante la ordenon «Palmes Académiques» pro sia laboro profesia kaj poesperanta. Li vizitis 27 Universalajn Kongresojn kaj organizis en 1957 blindulan antaŭkongreson en Lyon kaj zorgis pri la blindula partopreno en la UK de Marseille. Li pretigis en 1958 brajlan perkorespondan kurson por franclingvanoj kiu daŭre funkcias.

De 1958 ĝis 1992, kun la edzino, li dediĉis multajn fortojn al la redaktado de «Esperanta Ligilo». La familio aperis en multaj okazoj en artaj spektakloj dum kongresoj deklamante, aktorante, kantante, muzikante kaj ili eĉ strebis al plialtiĝo de la esperantaj konoj, trapasante triope kun la filo, pedagogian ekzamenon de Franca Esperanto-Instituto (FEI) en 1969. Li fariĝis komitatano de UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto) kaj FEI (Franca Esperanto-Instituto) kaj ankaŭ gvidis kurson en Liona regiono. En 1991 tamen, la malsano atakis Raymond, ĝi devigis lin pasigi dufoje semajne longajn horojn en kliniko. Tio bremsis liajn aktivajojn.

En 1994, li estis distingita kiel honora membro de UEA.

Ne estis ceremonio ĉar li donacis sian korpon al la scienco.

Ni prezentas niajn sincerajn kondolencojn al la edzino kaj la filo Hervé.

*J. CATIL GEE, franca sekiestro de ILEI*



## **Boris Kolker**

aŭtoro de la ĵus aperinta libro  
**Vojaĝo en Esperanto-lando**  
Perfektiga kurso de Esperanto kaj  
Gvidlibro pri la Esperanta kulturo



*pri la historio kaj verkado de la libro, pri  
sekretoj de bona klubvivo, kaj pri liaj  
instruistaj spertoj.*

*(La konversacio-partnero de Boris Kolker estas Katalin Kováts.)*

**Gratulojn okaze de la apero de tiu certe furora kaj sukcesa libro.  
Kial vi decidis verki tiun neordinaran libron\*?**

Mi opinias, ke la homo, kiu perfekte regas Esperanton, profunde konas ĝian kulturon kaj idearon, ne nur havas pro tio utilon kaj plezuron dum tuta sia esperantista vivo, sed ankaŭ neniam forlasos Esperantujojn. Mi decidis kontribui al tiu interproksimiĝo de esperantistoj kaj Esperantujo, tiel ke la interproksimiĝo okazu libervole kaj per facila vojo.

**Kiel naskiĝis la libro?**

Malklara ideo aperis ĉe mi komence de la 70-aj jaroj. Ĝi kristaliĝis meze de la jaro 1987, okaze de la centjariĝo de Esperanto. En la jaro 1990 mi finverkis la unuan version por la fama moskva eldonejo "Progreso". Ĝuste tiam Sovet-Unio kolapsis. Pro la ekonomia ĥaoso en la lando, la

\* Analizon kaj bildon pri la libro, kaj la koncernajn retpaĝojn, vi trovos, se vi vizitas la KATALOGON de <http://www.edukado.net>.

libro aperis nur en 1992, nur en kvanto de 4000 ekzempleroj (preskaŭ ĉiuj jam disvenditaj) kaj kun sufiĉe modesta ekstera aspekto.

Ekde tiam mia vivo kaj la mondo ĉirkaŭ mi ege ŝanĝiĝis, i.a., en 1993 nia familio transloĝiĝis en Usonon. Tiu ŝanĝiĝo nepre devis reflektiĝi en la nova versio de "Vojaĝo". Mi eklaboris pri ĝi en 1995, malnete finis en 1998 kaj faris la lastajn amendojn en majo 2002, kelkajn tagojn antaŭ la ekspreso de la libro.

**Kion vi sentis ekvidinte la novan eldonon de la libro? Ĉu ĝi superis viajn imagojn?**

La libro povis aperi du-tri jarojn pli frue, se mi ne proponus abunde ilustritajn ĝin. Mi antaŭsciis, ke ĝi estas eldonita bele. Sed la realo superis ĉiajn atendojn. Por la eksa grafikisto de UEA Francisco Veuthey kaj por la eksa Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller, "Vojaĝo" estis cigna kanto, do ili (same kiel mi) enmetis en ĝin siajn animojn. La rezulton mi sentas kiel miraklon.

**"Vojaĝo" prezentas al ni modelan klubvivon, tiom modelan, ke oni pensas: tia klubo ekzistas nur en fabeloj. Ĉu vi iam spertis, gvidis simile bonan kaj aktivan klubvivon, aŭ en la libro ricevis spacon nur viaj revoj?**

Unuavice, revoj, sed ankaŭ sperto de multaj Esperanto-klubo en la eksa Sovet-Unio. Mi esperas, ke "Vojaĝo" helpas radikale ŝanĝi la kluban vivon en la tuta Esperantujo. Komunaj intereso, komuna laboro, komuna tempopasigo estas la sekretoj de bona kluba vivo.

**Ĉu vi vidas diferencon inter la esperanta vivo de la eksa Sovet-Unio, de kie vi devenas, kaj tiu de la nuna Usono, kie vi nun loĝas?**

Usono estas *malsama* lando, ankaŭ koncerne Esperanto-movadon. Unuavice, oni ne forgesu, ke Usono estas citadelo de la angla lingvo kiel internacia lingvo. Malgraŭ tio, la usona Esperanto-movado estas sufiĉe forta kaj originala. Laŭ mia opinio, ĝi multe gajnis per plibonigo de la kluba vivo. Sed tio estas malfacile efektivebla en la usona vivoritmo.



**Krom esti bona ĉiĉerono, kio estas via profesio kaj viaj hobiaj?**

Mi estas ne nur ĉiĉerono en Esperantujo, sed ankaŭ en nia urbo. Profesie mi instruis la francan lingvon en fakultatoj de fremdaj lingvoj, laboris kiel interpretisto kaj poste, dum multaj jaroj, kiel tradukisto de scienc-teknika literaturo el kelkaj lingvoj. Mi estas doktoro pri lingvoscienco. Mi ŝatas vojaĝi kaj okupiĝi pri Interreto.

**Jes, tion mi suspektis pro via retroŝta kurso, Internacia Perfektiga Koresponda Kurso (IPKK) kiun vi gvidas per “Vojaĝo”. Kiom da personoj el kiuj landoj partoprenas tiun formon de lernado, kiuj estas viaj spertoj?**

Al la kurso aliĝis dudeko da personoj el sep landoj; aparte multas brazilanoj. Ok personoj jam diplomiĝis. La krea regado de la lingvo ĉe la lernantoj okulfrape kreskas de leciono al leciono.

**Ĉu vi gvidis ankaŭ ĉeestajn kursojn, havas ankaŭ tiukampe spertojn? Kiujn metodojn vi uzis dum viaj kursoj? Kiujn materialojn, krom la propraj?**

Eble vi miros, eksciinte, ke plurajn ĉeestajn elementajn kursojn mi gvidis per Ĉe-metodo, kiun mi tre ŝatas, kvankam konscias pri iuj ĝiaj mankoj en la nuna tempo. Ĉeestajn paroligajn kaj perfektigajn kursojn mi gvidis ĉefe per materialoj de “Vojaĝo”.

**Kiaj estas, laŭ vi, la bonaj instruistoj kaj kiel vi trejnus ilin?**

Bona Esperanto-instruisto perfekte scias la lingvon, amas ĝin kaj strebas transdoni al la lernantoj sian amon al Esperanto kaj strebon regi ĝin perfekte.

Unuavice, ili trastudu la novan eldonon de “Vojaĝo”. Poste ili trastudu kurson de metodiko de instruado, vizitu lecionojn de spertaj instruistoj, donu plurajn lecionojn sub gvido de spertaj instruistoj, kun posta analizo de la lecionoj.

**Kiuj estas tiuj 3 esperantistoj, de kiuj vi lernis, kiuj signife influis vin kaj iusence estis viaj instruistoj?**

*Profesoro Jevgenij Bokarjov* (Rusio) - kiu enkondukis min en interlingvistikon kaj esperantologion, *Profesoro Gaston Waringhien* (Francio) - li estis la plej erudicia homo en Esperantujo kaj ĉiam preta helpi, kaj *Ito Kanzi*, pseŭdonime Ludovikito (Japanio) – kiu kolektis kaj eldonis 55 volumojn de Plena verkaro de Zamenhof – kun kiu mi laŭeble kunlaboris.

**Kiujn konsilojn vi donus, kiujn eblojn vi vidas por plibonigi la prestiĝon kaj uz-teron de Esperanto?**

Oni agu en diversaj terenoj. Ŝajnas al mi, ke hodiaŭ apartan gravecon havas ĝia vasta uzado en Interreto.

**Planoj, deziroj por la estonteco?**

Mi ŝatus havi pli da tempo por ŝatataj okupoj. Verki libron pri Ludoviko Zamenhof. Resti sana kaj havi sanajn proksimumojn.

**Ni denove gratulas vin kaj deziras, ke viaj planoj kaj revoj efektiviĝu.**

\*\*\*

## *el la landoj kaj sekcioj ...*

### **Albanio**

**Jarraporto 2001/2002**

La iama albana ILEI sekcio estas kunfandita kun la Albana Esperanto Instituto kaj estas ricevinta la nomon de tiu lasta, ĉar tiu estas jure agnoskita enlande. Okazis ankaŭ estrarŝanĝiĝo: estro estas doc. Vasil Pistoli, sekretario Bardhyl Selimi, kasisto Rita Permeti.

Daŭris la laboro pri E-kursoj. Tiel malfermiĝis unuafaje E-lernokurso ĉe la blindulejo de Tirana kie akiris la atestilon por la elementa nivelo



almenaŭ sep gelernantoj. Estas jam decidite ke la lernokursoj en tiu blindulejo malfermiĝu pli amplekse la venontan septembron.

Aperis regule nia Bulteno ĉiun duan monaton enhavante ĉiam pli da materialoj diverstemaj. Daŭris la laboro por verki la grandan Albana-Esperantan Vortaron, je aŭtoro doc. Vasil Pistoli, kiu atingis ĝis nun 7000 vortojn. Estas antaŭvidite ke la vortaro ampleksu 30mil vortojn. Ĝis nun estas aperintaj pli malgrandaj vortaroj duflankaj enkadre de kelkaj lernolibroj por albanoj. Paralele, s-ino Eli Luli estas laborante por aperigi la alian grandan vortaron Albana-Esperanta kaj Esperanto-Albana verkita jam de s-ro Zef Mjeda, honora membro de UEA, jam forpasinta.

Nia Instituto daŭre zorgis pri la progreso de niaj gestudentoj ĉe la klerigejo de Monda Turismo kaj AIS en Bydgoszcz, kie lastan septembron diplomiĝis niaj sep unuaj studentoj. Bedaŭrinde ili ankoraŭ ne estas ricevintaj la promesitajn kvinlingvajn diplomojn de AIS pro kelkaj kontraŭdiroj inter MT kaj AIS. Tio estas granda demand-punkto pri la estonto de tiu klerigejo, tiom grava por la E-movado.

Nia Instituto daŭrigis sian propagandan laboron per radio kaj TV pri kaj por Esperanto. Estas registritaj du gravaj elsendoj en Radio Tirana kaj Tutlanda TV stacio.

Estas tradukita kaj eldonita de Esperanto versio la ĉefverko de s-ro Ĵelju Ĵelev, eksprezidento de Bulgario "Faŝismo aŭ la totalisma ŝtato". Antaŭ ĝi estas tradukita kaj eldonita alia verko filozofia de s-ro Bruno Vogelmann "La Nova Realismo".

La membraro estas iel plijunigita per novaj membroj, niaj jam bakalaŭrigitaj studentoj en Pollando: Ariel Myrazi, Matilda Sokoli, Fjoralba Ceno, Faela Mezini, Ereid Dhimitri.

*Bardhyl Selimi, sekretario de Albana Esperanto-Instituto*

## Ĉinio

La 1-an junio 2002 okazis la Tria E-ekspozicio por infanoj en la elementa lernejo Fuzimiao en Nankino, Ĉinio. La ekspozicion de diversaj libroj, kolektoj kaj instruaj materialoj pri Esperanto vizitis pli ol 200 instruistoj, lernantoj, kaj esperantistoj. Oni povis utiligi la ekspozicion por interŝanĝi spertojn pri la lingvolernado kaj uzado de Esperanto. La organizanto, Zhuang Rui ricevis pli ol 100 gratulojn el 36 landoj.

*Informis: Zhuang Qixiong, zhuangespero@sina.com*

## Finlando

### Kunlaborantoj serĉataj

Ni en Finnlando planas instrumaterialon pri EU. Estus priskribo pri la evoluo de EU, la nuna stato kaj kompreneble pri la lingvopolitiko. Ĉu iu jam havas tian materialon aŭ volas kunlabori kun ni? La instrumaterialo samtempe funkcius kiel daŭriga kurso. Por komencantoj ni plejparte uzos Mazi, por kiu ni ankaŭ planas ampleksan ekzercaron kaj gvidlibron por instruistoj. Ĉu tia laboro okazas ankaŭ en iu alia lando? Ĉu ni povus kunlabori?

*Carola Antskog, prezidanto de ELFI  
cantskog@kolumbus.fi*

## Hungario

### Formado de E-instruistoj en Universitato ELTE Budapeŝto

En ELTE inter 1966...2006 estis kaj estos formado de filologoj de 'lingvo kaj literaturo Esperanto'. En 2001 registara ordono transformis la hungaran superan edukadon, kaj modifis la kondiĉojn ankaŭ por Esperanto. Laŭ tio studentoj jam akceptitaj al la E-fako rajtos fini siajn studojn ĝis 2006. Ekde 2001/02 oni ne povas akcepti novajn studentojn por la universitatnivela filologia formado. Oni zorgos pri la studentoj (laŭnombre 18), kiuj iam komencis kaj ankoraŭ ne diplomiĝis.

Ekde 2002/03 funkcios altlernejnivela formado. La celo estas formi instruistojn de Esperanto kaj aliaj lingvoj en nova kadro. Do la estontaj instruistoj de ekz. la angla, Esperanta, franca, germana, itala, kroata k.a. lingvoj havos 4-jaran samnivelan (95-kreditan) formadon, same devas elekti ankaŭ alian, paralele studatan lingvon kaj ili finos kiel diplomitaj instruistoj de po du lingvoj.

La bedaŭrinda diferenco estas, ke por Esperanto ne eblas, sed por aliaj lingvoj plu eblas (ankaŭ) universitatnivela formado de diplomitaj filologoj (kaj instruistoj). Samtempe aŭtomate doniĝas la eblo, ke pro la malpli multa tempo bezonata lerni la lingvon mem, oni povas pli detale okupiĝi pri esperantologiaj, ĝeneralaj lingvistikaj, interlingvistikaj kaj aliaj studoj.

Vi povas vidi la modelan studprogramon por la 4 altlernejnivelaj jaroj en la hejmpaĝo: <http://www.extra.hu/vaganto>.

*laŭ informoj de Iván Bujdosó kaj Ottó Haszpra*



## Germanio-Armenio

Germana kaj Armena E-Asocioj ĉi-printempe efektivigis belan ekzemplon de ambaŭflanke utila laboro: Ni, du armenaj geesperantistoj, estis invititaj prelegvojaĝi, prezentante armenan kulturon, historion, tradiciojn en pli ol 20 esperantaj kluboj de Germanio.

Dekomence ni partoprenis PSI (Printempa Semajno Internacia), kiu estas tradicia aranĝo de GEA. Ĝin partoprenis 170 esperantistoj el 18 landoj. Ĉi-jare PSI okazis en Domo "Maria Rozenberg", kiu situas en pitoreska distrikto Pirmasens.

Programo de PSI estis riĉa kaj abunda: Paska festo, ekskursoj al germanaj kaj francaj regionoj, lingvaj kaj danckursoj, Mazi-horo kaj manlaboro por infanoj, koncertoj k.t.p.

Por prezenti Armenion en programon estis metitaj leciono pri armena lingvo, kuirarto, trarigardo de vidbendo, kie 16 "Ave Maria"-j de diversaj aŭtoroj estas prezentitaj de kvar kantistinoj, unu el kiuj estas esperantistino, prelego pri Armenio kun demonstrado de diapositivoj, kantado de armenaj kantoj armene kaj esperante. Dum adiaŭa vespero ni prezentis kelkajn kantojn kaj nacian dancon.

De 5a de aprilo komenciĝis nia prelegvojaĝo tra la urboj de Germanio. Dum vojaĝo interesaj kaj bonkoraj homoj konatigis nin kun historiaj vidindaĵoj de la lando. Ni havis feliĉon viziti la plej grandan germanan Esperanto-bibliotekon en urbo Aalen, ĉeesti esperantlingvan diservon en Konstanco, ni estis akceptitaj de urbestro en urbo Detmold. En Freiburg oni invitis nin al radiostacio "Triangulujo 102,3 MHz", kie nin intervjuis mem d-ino Ursula Niesert, en urbo Hameln ni tagmanĝis kun ĵurnalisto, kiu poste skribis artikolon pri nia prelegvojaĝo en loka revuo.

Antaŭ nia alveno en diversaj germanlingvaj gazetoj organizantoj anoncis pri tiu aranĝo, kaj dank'al tio dum prelegoj ĉeestis ankaŭ neesperantistoj, por kiuj nia prelego estis tradukita al germana lingvo.

Dank'al niaj gastigantoj ni ekvidis originalan panoramon de Nordlingen, suprengrimpis al 32a etaĝo de turo en Frankfurto, trarigardis Olimpikan parkon de Munkeno, starante sur artefarita altaĵo, malnovajn partojn de urboj Nürnberg, Kolonjo, Heidelberg, Halle, Bremen.

Nia vojaĝo estis ege streĉa, kun oftaj translokiĝoj kaj prelegoj. Ĝi sukcesis vekti intereson kaj deziron de niaj novaj geamikoj viziti Armenion.

Post nia reveno al adreso de AOKS (Domo de Amikeco) ni ricevis dankleteron de estraranoj de GEA pro sukcesa laboro.

Nian vojaĝon kaj esperantan movadon en Armenio ni nun reklamas en centro de urbo Erevan sur surstrata stando apud AOKS.

Ni, Lida Elbakjan kaj Stepan Sargsjan, deziras danki niajn germanajn geamikojn Martin Schaefer, Ursula Niesert, Wolfgang Loose, Franz Kruse kaj aliajn por la altnivela organizado de la prelegvojaĝo.

*Lida Elbakjan, prezidantino de AEA;  
Stepan Sargsjan, Membro de AEA.  
LIDELB @freenet.am*

## Svislando

### Jarraporto de la Svisa ILEI-Sekcio 2001

En Svisa ILEI-Sekcio (SIS) estas 16 membroj. Mireille Grosjean estas la sekciestro. Foje la membroj instruas en lokaj grupoj. Ankaŭ aliaj personoj instruas en lokaj grupoj.

Nome de SES Svisa Esperanto Societo Mireille Grosjean komencis informi la ĵurnalistojn en Romandio. Ŝi sendis la saman materialon al la centroj de dokumentado de la instruistoj, al universitatoj kaj al priedukaj instancoj, ĉar la instruistoj estas la plej grava celpubliko de SES.

En La Chaux-de-Fonds estas Kultura Centro Esperantista, gvidata de Giorgio Silfer kaj similaj. KK personoj frekventas KCE kaj aliajn aranĝojn, sed malmulte. En la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds estas tre grava esperanto centro: la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia CDELI. Tie laboras Claude Gacond, iama direktoro de KCE kaj SIS membro. Li zorgas pri perkoresponda kurso, li akceptas la studentojn dum studsabatoj interesege. Li ankaŭ akceptas pedagogojn kaj lertigas ilin. Tiuj estas ege valoraj renkontiĝoj. Venas multe pli da homoj al CDELI ol al KCE... Ofte 25 ĝis 30 personoj.



Laŭ mia scio ne okazas kursoj en publikaj lernejoj nek en universitatoj. Estas kurso en privata lernejo La Grande Ourse.

Dum 2001 Mireille Grosjean konceptis plenan instruprogramon pri „edukado pacen”, kiu entenas lernadon de Eo. Tiu plano estos prezentata en UK. Ĝi estas sur la hejmpaĝo de ILEI en Eo kun ligo al franca versio. La hispana versio kaj la itala ekzistas kaj baldaŭ estos ankaŭ atingeblaj sur la paĝo de ILEI.

Broŝuro "langues, opération survie" de Claude Longue Epée estis sendita al ĉiuj romandaj instru-departementoj. Venis unu reago ne tre pozitiva. Ni povas konstati, ke la homoj ne kutimas pensi pri la invado de la angla kaj la minaco al la lingvodiverseco. Tamen la situacio estas ege malbona en Svislando, ĉar la varbistoj ofte kontentiĝas pri anglalingva versio de frapfrazo anstataŭ ol traduki ĝin al 3 lingvoj. Eĉ registaraj oficejoj faras tion. Mireille Grosjean konsekvence skribe reagis kaj kuraĝigas la esperantistojn fari la samon. Ŝi konvinkis du parlamentanojn, kiuj reagis per demando al Federa Konsilio dum la aŭtuno.

*Mireille Grosjean, sekciestro*

## Usono

### Jarraporto de la Usona ILEI-Sekcio 2001/2002

Dum la pasinta lerneja jaro (sept. 2001-junio 2002) pli ol mil Usonanoj lernis Esperanton, laŭ Kent Jones, la Eduka Sekretario de la Amerika Asocio de la Instruado de Esperanto (AAIE). Ĉe la jarkunsido de AAIE la 22-an de junio 2002, elektitiĝis nova Eduka Sekretario, June Fritz.

Ĉe la ILEI-konferenco en Lovran lastan someron, reprezentis AAIE-on kiel komitatoj nia prezidanto Ron Glossop, nia koresponda sekretario Sally Lawton, kaj Bill Maxey. Danke al la diligenta laboro de Phil Dorcas, la vic-prezidento de AAIE, pasintjare AAIE akiris 10 novajn membrojn (nun estas entute 54). Kaj kiel antaŭe, ĉiu membro de AAIE daŭre estas aŭtomate ano de ILEI (ĉirkaŭ 62% el ĉiu AAIE-kotizo de USD 25, estas pagita kiel ILEI-kotizo). Sekve, ĉiu AAIE-ano ricevis la Internacian Pedagogian Revuon de ILEI, kaj kiel AAIE-ano, la kvaronjara dulingvan (Esperanto kaj angla) 'AAIE-Bulteno'-n. Inter ties rubrikoj estas Instru-sugestoj, Esperanto-instruado Alilande, Esperanto

kaj la Reto, Rekomendinda Legado, Volas Korespondi, ILEI-Aferoj, kaj De kaj pri Niaj Membroj.

AAIE-prezidanto Ron Glossop ĉi-jare iĝis la estro de Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, kaj tiurilate korespondis kun infanoj kaj instruistoj en Usono, Kanado, Britio, Meksiko, kaj Rusio.

Dum la pasinta jaro AAIE daŭre kunlaboris kun la Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko (ELNA). Jen ekzemploj:

- 1) AAIE-membro Lusi Harmon estras la ELNA instru-vidbendan projekton 'Pasporto al la Tuta Mondo', kies 15 lecionoj estas preskaŭ finpretaj por uzi tutmonde en televido, klasĉambroj, klub-kunvenoj, ktp.
- 2) Tuj post la ELNA-kongreso pasintan junion, antaŭa AAIE-prezidanto Duncan Charters kondukis elstaran 6-horan instrukurseton pri kiel instrui Esperanton surbaze de la vidbendo 'Pasporto al la Tuta Mondo'. La kurson oni filmis por estonta uzado.
- 3) La eks-Eduka Sekretario de AAIE, Kent Jones, ankoraŭ deĵoras kiella Komisiito de Edukado de ELNA.
- 4) Phil Dorcas, vic-prezidanto de AAIE, nun estras ELNA-programon 'Intergrupa Atingo-Programo', kiu celas plibonigi la agadojn de lokaj grupoj, inkluzive instruadon kaj ekzamenigon.
- 5) Denove ĉi-jare estis inkluzivita en la ELNA somera kursaro NASK pedagogian kurson por instruantoj de Esperanto.
- 6) La Usona Ekzamena Servo, sub la aŭspicio de ELNA kaj AAIE, denove administris ekzamenojn, kiuj estas nur por anglalingvanoj. Sukcesis 3 per la Komencgrada, 1 per la Duagrada, kaj 1 per la Supera.
- 7) En la ELNA perkoresponda kursaro, kiun administras AAIE-membro Doroteo Holland, 128 ankoraŭ lernas, kaj dum la pasinta jaro 4 novaj aliĝis kaj 4 finstudis. Multaj, aparte junuloj, preferas ret-kursojn, pri kiuj malmultaj informoj haveblas.

En sia jarraporto Pil Dorcas, AAIE vic-prezidanto, rekomendis aŭdacajn plibonigojn, inkluzive la kreadon de ret-kurso kiu havas aŭdeblejn prononcon kaj dialogojn, kaj kiu preparas la lernantojn por sukcesi en la baza ekzameno de Usona Ekzamena Servo.


*Doroteo Holland, sekciestro*



## pri E-instruiloj . . .

### Blazio Vaha: Post la iama *Fantaziaĵoj* – ankaŭ la novaĵo<sup>1</sup> de Jon Rommesmo estas por infanoj

Oni konis kaj laŭdadis kantetojn, versaĵetojn de Jon Rommesmo ankaŭ pli frue – ekzemple, laŭ lia libro *Fantaziaĵoj kaj kantoj por infanoj*. Jam el tiu tempo ni povas rememori instru-kantetojn pri skribado, legado, kalkulado.



DANIEL' KAJ GABRIEL'  
KUNVETURAS SEN KYEREL'.  
IRAS ILI TRA TUNEL',  
POVAS VIDTI PER KANDEL'  
....  
ŜIRMAS ILIN LA OMBREL'  
KURAS ILI AL HOTEL'

Aperis jam tie la instru-truko de Jon Rommesmo plejeble multfoje ripetigi vortojn, esprimojn lernindajn:

ĈO HAVAS ĈAPON  
SED NENIUN HAVAS CO;  
ĈO HAVAS ĈAPON  
SED NENIUN HAVAS CO;  
NI KANTAS NUN PRI ĈO KAJ CO  
JEN – NI KANTAS NUN PRI ĈO KAJ CO  
JEN – NI KANTAS NUN PRI ĈO KAJ CO –  
NI KANTAS NUN PRI ĈO KAJ CO

En tiu libro oni povis rimarki, ke Jon Rommesmo bonajn rim-substantivojn iam ajn kapablas kompletigi je strofo, kaj li ne timas la diversaĵojn de mil specoj meti tuj en *unu* bildon:

Pasis kelkaj jaroj, kaj en la jaro 2001a aperis jen kio: *Esperanto ABC*. Eldonis ĝin: *Esperantoforlaget – Eldonejo Esperanto, Olaf Schous v. 18, 072 Oslo, Norvegio*. La identiga numero estas ISBN 82-90006-14-4. La

<sup>1</sup> Esperanto ABC

libreto ampleksas 32 numeritajn paĝojn, plus la ne-malplenajn kvar flankojn de la kovriloj.

Sub la mezmalgrandaj literoj de la verda vorto ESPERANTO sur la titolpaĝo aperas bruna, flava kaj viola literoj **A** kaj **B** kaj **C**: Ili estas ja tre grandaj majuskloj. Inter ili kaŝas kaj montretas sin kapetoj de kvar infanoj kiuj per siaj sumaj haŭtkoloroj tradicie esprimas tutmondecon.

Sur ĉiu maldekstra paĝo de la libreto estas po du literoj, laŭbezone kaj laŭdece substantivecaj aŭ ne – ekzemple: **A** kaj **Bo**, **E** kaj **Fo**, **I** kaj **Jo**, tamen aperas la duonvokalo **ŭ** sen helpa (aŭ malhelpa) *o*. Sur ĉiu dekstra paĝo estas po du bildoj aŭ bildogrupetoj. Ĉe **A**: *alko* kaj *aŭto*, ĉe **B**: *bonveniga ŝildo*, *bakisto* kaj *bulkoj*. — Ne aperas *ce*, *ef*, aŭ *em*, nur **Co** kaj **Fo**. kaj **Mo**, **No**. – la literonomoj do estas Fundamente kaj senĝene monotonaj, konforme al la instrucelo.

Jon Rommesmo kalkulas la literojn... konstatas ilian lokon en la vicordo; li kunskribas ordajn numerojn kiel estas skribita ĉi tiu: *dudekkvara*. Laŭ Bertilo Wennergren kaj la Zamenhofa Ekzercaro *dudek kvara*... estus ebla, *dudek-kvara* estus eminenta. Ankaŭ *dudekkvara* estas... tolerebla.

Lastatempe multaj esperantistoj forlasas siajn esperantajn personajn nomojn. Jon Rommesmo kultivas ilin, supozeble ankaŭ tial, ĉar li ne volas tute definitive decidi, ĉu *Maljuna Marteno* aŭ *Tomaso* estas franco, anglo, hungaro, germano, aŭ aŭstraliano. Sed gravas ankaŭ, ke la esperanta ritmo kaj sonefekto estu senriproĉa. Ĝi estas tia: *Tomaso trinkis tridek tri tasojn da teo. Olavo rigardas la ondojn de la oceano*. Aliaj nomoj en la poemetoj: *Dino* (kiu estas saŭro, *Eva* kaj *Edvardo* (ludemaj), *Gilberto* (la giganto), *Hungara Helena* – mi, hungaro, tamen pensus Helenan alinacia – ĉu greka aŭ pola aŭ.... ..hispana?). Sekvas en la libreto la juna *Jakobina* kaj *Jeromo* (jurnalisto), *Lina* (lernanta la litovan lingvon), *Niĉjo* (el Niĝerio) kaj *Paŭla*. Sur la 12a paĝo Italo invitas, se citi, izraelanon, sed mi pensas, ke efektive temas pri israelano. Ĝercemulo ion kaŝis sur la 24a paĝo: eble la finaĵon de la verbo post la radiko *kaŝ*... Oni do ĉesu konjekti pri preseraro. Tamen la ŝercemulo kaŝ (-as aŭ -is) ankaŭ ŝtrumpetojn (ne videblajn) kaj ŝuojn (tamen cideblajn)..

Sur la lasta paĝo estas du sammelodiaj ĉenkantoj nomataj ĉi tie (tute nesenrajte) kanonoj. Temas pri la konata franca melodio, kiun mi



renkontis unue supozeble en la Lančov-a, tendaro proksime al urbo Znojmo, kaj kiu tie estis kantata kun la komencaj vortoj *Frat' Jakobo, Frat' Jakobo ĉu en dorm'* kaj kiun poste mi aŭdadis, eble en Sunkompanio de la vilaĝo Arrout, en formo *Frato Jako Frato Jako, frato Jako levu vin, lavu vin.....* Mi do ĉi-foje ekkonis novan, por mi trian varianton, tiun de Jon Rømmesmo: *ĉu vi dormas, ĉu vi dormas frato Jak'*. Ho, nia amata, plurnoma, plurjara kaj plurjaka Jakobo, vestu vian torson varme, kaj kolektadu plu viajn Esperantajn versojn kaj versiojn. Ĉi-foje viaj notoj, tonoj kaj akcentoj reciproke trovis sin kaj estas en ordo, dank' al la konataj konoj de Jon Rømmesmo.

La skemecaj bildetoj al mi, plenkreskulo, konvenas, tamen ne ĉiu desegnita vizaĝo ŝajnas al mi afable amuza aŭ agrable mokinda, konforme al infaneta plaĉo laŭ mia imago. Pli severe mi povus diri, ke ne ĉiu bildo plaĉas - tamen: ili sendube bone klarigas la paralelajn frazojn. La tekstetoj ŝajnas kreitaj laŭ principo, ke lingve bona frazo, kiu estas sana laŭ la enhavo, jam estas konvena por edukado. Se tian frazon oni spicas per aliterado (kiel tion faras Jon Rømmesmo), tion esperantisto povas senĝene ĝui: *Maljuna Marteno manĝis multajn Migdalojn. Tomaso trinkis tridek tri tasojn da teo. Eta frato mia ŝatas frititan fiŝon. Granda giganto Gilberto glitfalas sur glata glacio.*

Okazas unufoje, ke „bildano” kvazaŭ parolas: la ritma teksto kiun li elbuŝigas, sonas jene, laŭ encirkla skribo meze de la bildo: *ĉapelo / mia havas, / tri pintojn / havas ĝi, se / pintojn ĝi / ne havas, / ne mia / estas ĝi.* (La saman tekston, cetere, mi konas jam el Fantaziaĵoj... sed tie ĝi havis pli da memstareco.)

Diferencas de mia normo aŭ kutimo la vorto pri la virkoka blekado en la frazo *Knaboj kantas kaj koko kikerikas*. Mi kaj miaj vortaroj preferas *kokerikadon*, sed mi ne rezistos, se oni juĝos, ke kikerikado estas pli sonimita. Mi lernis toleremon pri diversetnaj kokokrioj de Stefan MacGill, kiu en sia *La laŭta vekhorloĝo* pruvis, ke en Esperantujo, virkokujo kaj la mondo eblas dekoj da virkok-sinesprimoj...

Vi povas aĉeti ĝin ankaŭ de: *Eldonejo Esperanto (Forlaget), Olaf Schous v. 18, NO-0572 Oslo, Norvegio. Retpoŝto: nel@esperanto.no. Poŝtĝiro: 0540 0874052. UEA-konto: espv-s. Ĝi kostas 65 norvegajn kronojn + sendokostojn.*

Nu, tia estas la libro. Havinda...

*Blazio Vaha*

## el nia por via LERNILOTEKO...

NdlR: *En la sekvaj numeroj ni intencas aperigi kelkajn ekzercojn el la LERNILOTEKO de la hejmpago [www.edukado.net](http://www.edukado.net).*

*Se vi havas ideon pri tio, kiu ekzerco premiigu per enrevua publikigo, bv. skribu tion al la redaktoro. La redaktanto de la paĝaro volonte bonvenigas ankaŭ viajn kontribuojn.*

**edukado.net**

El la LERNILOTEKO de ..... Aŭtoro: Katalin KOVÁTS

**Kiel mi veturu al Tromso?**

**Interaktiva ludo.**

### Baza situacio:

Mi devas veturi al norda Norvegio, urbo Tromso, kie mi prelegos dum tre grava Unesco-konferenco. Mi devas decidi per kiu flugo mi vojaĝu, kiun itineron mi elektu. Mi havas du eblojn:

Flugkompanio Dato De kie Kien Ekiro Alveno

### Tien:

#### **A-versio**

MA 772	03majo	Budapeŝto	Oslo	18.25	20.55
SK 386	03majo	Oslo	Tromso	22.30	00.15 +1

#### **B-versio**

KLM	03 majo	Budapeŝto	Amsterdamo	6.45	9.00
KLM	03 majo	Amsterdamo	Oslo	16.30	18.20
KLM-SK	03 majo	Oslo	Tromso	20.40	22.25 +1

### Reen:

#### **A-versio**

SK 375	07majo	Tromso	Oslo	1205	1355
MA 771	07majo	Oslo	Budapeŝto	1510	1735



## B-versio

KLM-SK	07 majo Tromso	Oslo	10.05	11.50
KLM	07 majo Oslo	Amsterdamo	12.35	14.30
KLM	08 majo Amsterdamo	Budapeŝto	7.45	9.45

## Helpu decidi!

### Konsideru la sekvajn aferojn por la bona decido:

1. Loĝante en la provinco, por alveni al Budapeŝto mi devas tri horojn trajnumi, kaj en la ĉefurbo mi bezonas pli ol du horojn por veturi de la stacidomo al la flughaveno.
2. La lasta trajno el Szombathely, mia urbo, al la direkto de Budapeŝto ekiras je 18.00, la unua matene je 6.00.
3. Mi havus eblon tranokti en Budapeŝto.
4. Mia familio malofte vidas min, do ni ŝatus kiel eble plej multe esti kune.
5. La flugbileto tra Amsterdamo kostos signife malpli ol se mi flugus rekte al Oslo.
6. Mi havas membrokarton de KLM, kolektas iliajn poentojn, kaj se mi havos iun certan kvanton de tiuj, mi povos havi diversajn avantaĝojn.
7. Mi ne konas Tromso, tie mi loĝos en pensiono.
8. Mia prelego okazos la 4an de majo.
9. Mi havas bonajn amikojn en Amsterdamo, mi povus tranokti ĉe ili, kaj ili certe tre ĝojus gastigi min.
10. Lunde vespere mi jam havas kurson en mia hejmurba altlernejo.
11. Ne eblas miksi la flugkompaniojn, mi devas reveni per tiu per kiu mi tienvoje flugis.
12. Mi estas ĉiam tre okupata.
13. Finance ĉiu groŝo tre valoras.

### Konsiloj por la uzo:

Por la ludo necesas minimume 2 personoj, sed la plej efika estas kun la partopreno de 7-9 personoj.

La argumentoj estas kreitaj tiel ke ne estas tucerta venka solvo.

- Unue la lernantoj ricevu la tekston kaj havu tempon ĉ. 5 minutojn por silente legi, kalkuli, cerbumi kaj preni sian decidon.
- Poste la ludantoj grupigu en A kaj B grupoj laŭ tio kiun solvon ili prenis post la unua tralegado. (Ĝenerale estas ĉiam diversaj

decidoj, sed se ne, la instruisto transprenu la kontraŭ-opinian pozicion.) Se dum la argumentado iu ŝanĝas sian pozicion, povu ŝanĝi ankaŭ sian grupon.

- La instruisto elektu personon, al kiu la grupanoj donas konsilon. Se estas malmulte da lernantoj, sed tamen du diversopiniaj grupoj, la rolon de la vojaĝonto povas preni ankaŭ la instruisto mem.
- Unu post la alia la grupanoj donu konsilon pri tio kiu versio estu elektata, kaj ĉiam argumentu pri sia solvopropono.
- La argumentado estas malpli facila, se la tekston la lernantoj ricevas en sia nacia lingvo, ja ĉion ili devos traduki al E-o.
- Kiam la vojaĝonto preskaŭ akceptas la proponon, la alia grupo kontraŭargumentu.
- Ĉio iru laŭ sia vojo kun laŭeble malmultaj instruistaj intervenoj.
- La ludo daŭru ĝis la vojaĝonto prenas sian decidon kaj deklaras per kiu flugo kaj kial ĝuste per tiu vojaĝos al Tromso.
- La ludon estas bone prepari tiel, ke la lernantoj antaŭe lernu aŭ ripetu la esprimojn, per kiuj oni povas konsenti, kontraŭdiri, akcepti ies opinionon, ktp. Depende de la nivelo de la grupo tiuj frazoj, esprimoj povas pendii sur la muro aŭ esti skribitaj surtabule, ke oni havu helpon krei siajn frazojn.
- La tempodaŭro de la ludo estas ĉ. 10-15 minutoj inklude la memstaran legadon de la tasko.

La temo estas prenita laŭ tutvera situacio, kaj se oni tre scivolas kiun elekton prenis la verkinto, oni povas retroŝte demandi tion kaj eĉ tion ekscii kiuj flugoj kiom malfruis, kiuj aliaj, antaŭe neviditaj eventoj malfaciligis tiun vojaĝon. Povas esti hejmtasko demandigi tion al mi [katalin@ikso.net](mailto:katalin@ikso.net). Respondo garantita.

*por via notlibro . . .*

### La Fondaĵo Saliko restariĝas virtuale

La Fondaĵo Saliko, siatempe starigita de la gefratoj Peter kaj Eliza Weide, memore al Edith kaj August Weide, ĉesis funkcii kiel fondaĵo ĉe UEA pasintjare, sed ĝi restariĝis virtuale. Do, daŭre ekzistas la premio Saliko,



kiu subtenas la instruadon de Esperanto, precipe en landoj sen organizita movado, kaj ĝi normale konsistas el 2.000 eŭroj, kiuj povas esti dividataj inter pluraj subtenindaj celoj.

La finan decidon faras la gefratoj Weide, sed laŭ propono de komisiono starigita de la estraro de UEA. La komisiono konsistas el: Gbeglo Koffi, Maŭro la Torre kaj Trevor Steele.

Bonvolu tra la jaro sendi viajn proponojn rete al Gbeglo Koffi, <esp.togo@cafe.tg> aŭ papere al Trevor Steele, ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg, 176, NL-3015 BJ - Rotterdam, Nederlando

## Dank-anoncoj

Dankon al jenaj donacintoj por JA kaj ILEI: *Maria Joykity* (AU), *Jennifer Bishop* (AU), *N. Caragea*, Afrika Fonduso.

La nunan numeron provlegis *Katalin Kováts* kaj *Bill Maxey*. Dankon al ili! Ni serĉas provlegemulojn (prefere kun retkontakto) por IPR 02/4!

**GAJNU**  
ĜIS € 350!

# Ekspedicio

# 'OTANOM 2003'

Partoprenu en nia granda  
serĉekskurso kaj havu ŝancon  
pri grandiozaj premioj!

Por pli da informoj petu provekzempleron de

MONATO: Flandra Esperanto-Ligo,  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen  
Telefono +32 32 34 34 00;  
telekopiilo +32 32 33 54 33;  
relpoŝto: monato@fel.esperanto.be

**Monato**  
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

## LABORKOMISIONOJ

**Ekzamena:** Duncan Charters (prezidanto), Bill Maxey (sekretario) ✉: [bmaxey@visi.net](mailto:bmaxey@visi.net)

**Elekta:** Gwenda Sutton (kunvokanto), Maritza Gutierrez, Joseph Catil

**Kontrolo:** Bertil Andreasson, Lars Forsman, Bo Sandelin

**Lerneja:** Marija Beloŝević, Jennifer Bishop, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Géza Kurucz,  
Maŭro La Torre, Raita Pyhälä

**Regulara:** Rob Moerbeek, Hans ten Hagen

**Terminara:** Maŭro La Torre

## KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

**FIPLV** (*Internacia Federacio por Instruistoj de Modernaj Lingvoj*)

Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop** ✉: [esperanto@Education.monash.edu.au](mailto:esperanto@Education.monash.edu.au)

**IEI:** *Internacia Esperanto-Instituto*, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

**UEA:** *Universala Esperanto-Asocio*, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Reprezentanto de ILEI: **Maŭro La Torre**; estrarano de UEA pri edukado: **Gbeglo Koffi**.

**UNESKO** (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **Renée Triolle**, Bello Baucó, Chemin de la Civade Verde, FR-13600, La Ciotat, Francio; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Courmon d'Auvergne, Francio, tel. (+33) 4 73 84 90 60;

**Mireille Grosjean**, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando,

tel.+fakso (+41 32) 932 18 88, ✉: [mireille.grosjean@rpn.ch](mailto:mireille.grosjean@rpn.ch)

## MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

ILEI estas jure registrita ĉe la komerca ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

La membreco inkluzivas ricevon de 4 numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto: *Boo Mee Kim-Lindblom*, *Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge*; tel. (+46 8) 777 4175, ✉: [boomee.kimlindblom@swipnet.se](mailto:boomee.kimlindblom@swipnet.se), *postĝirkonto: 682117-7*. IBAN (Internacia Bank-konto) numero: SE 2595 000099 604206 821177. *Stokholmo, S.W.I.F.T. - kodo: PGSISESS*. Membro-kotizoj: A-landoj (laŭ UEA-divido): 14 EUR, B-landoj: 8 EUR. Simpla abono sen membreco: 18 EUR. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA: *UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64*. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago. Kontoj ĉe UEA: ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko) kaj pike-b (Projekto Interkulturo). Detala listigo de pagmanieroj al UEA aperas sur p. 39 de Jarlibro 2001. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago.

**Reklamtarifoj por IPR:** 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

Hejmpaĝo de ILEI ĉe: <http://il.uniroma3.it/ilei>

## REDAKCIAJ INFORMOJ

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende. **Presado:** Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Tel: +32-3-234 34 00. **Redaktejo:** NÉMETHI József, HU-8531 IIIÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: [www.nl-papa.hu/ipr](http://www.nl-papa.hu/ipr); [jozefo@nl-papa.hu](mailto:jozefo@nl-papa.hu); [jozefo\\_nemeth@hotmail.com](mailto:jozefo_nemeth@hotmail.com), tel/fakso: +36-89/ 356-050. Laboreja fakso (ĝi funkcias nur en lernotagoj, antaŭtagmeze): +36-89/ 324-896). Nia vicredaktorino: [katalin@ikso.net](mailto:katalin@ikso.net). La revuo aperas ankaŭ kasete registrita por leg-handikapuloj. Informas: Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk.

La nunan numeron ni sendis al la presejo la 21-an de aŭgusto 2002, **redaktfino por la sekva numero: la 30-a de oktobro 2002.**



## SEKCIESTROJ

**Albanio:** Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana  
✉: [selimib@albbmail.com](mailto:selimib@albbmail.com)

**Argentino:** Teresita Alaniz, El Ombú s/n, AR-5801 Alpa Corral

**Aŭstralio:** Kay Andersen, P.O. Box 186, Moorooka AU-4105 ✉: [kjand@ozemail.com.au](mailto:kjand@ozemail.com.au)

**Belgio:** Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

✉: [raymond.wylleman@pi.be](mailto:raymond.wylleman@pi.be)

**Brazilo:** Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)

**Britio:** Grahame Leon-Smith, The Niven Suite, The Mansions, Ottershaw Park, Surrey, KT16 0QG.  
✉: [grahame.leon-smith@free-computers.org](mailto:grahame.leon-smith@free-computers.org)

**Ĉeĥio:** Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratiškovice 938

✉: [mmelicharek@iol.cz](mailto:mmelicharek@iol.cz)

**Ĉinio:** Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan  
✉: [zdchen@public.wh.hb.cn](mailto:zdchen@public.wh.hb.cn)

**Finnlando:** Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito

✉: [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi)

**Francio:** Joseph Catil, 5, rue des Calabres, FR-69330 Meyzieu,

✉: [josepf.catil@wanadoo.fr](mailto:josepf.catil@wanadoo.fr)

**Germanio:** Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

**Hungario:** József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Iház

✉: [jozsef@nl-papa.hu](mailto:jozsef@nl-papa.hu)

**Irano:** Hamzeh Šafii, P.O. kesto 17765-184, IR-Teheran

✉: [ilei.ir@esperanto.org](mailto:ilei.ir@esperanto.org)

**Italio:** Luigia Oberaucht Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma

✉: [vmadella@tin.it](mailto:vmadella@tin.it)

**Japanio:** Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, JP-181-0001 ✉: [masumi-s@s@gw3.gateway.ne.jp](mailto:masumi-s@s@gw3.gateway.ne.jp)

**Katalunio:** Luz Vázquez, Apartat 553, ES-43200 Reus  
✉: [ileicat@hotmail.com](mailto:ileicat@hotmail.com)

**Kroatio/KEU:** Anka Jagnjić, Stubička 75, HR-10000 Zagreb,  
✉: [anka.jagnjic@zg.tel.hr](mailto:anka.jagnjic@zg.tel.hr)

**Kroatio/KEU:** Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb

**Kubo:** Pedro Fernández Rodríguez, Requena No. 17 apto. 1 entre S.Allende y Lugareño, Plaza, CU-10600 Ciudad de la Habana,

✉: [kubesp@ip.etecsa.cu](mailto:kubesp@ip.etecsa.cu)

**Nederlando:** Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag,  
✉: [iei001@worldonline.nl](mailto:iei001@worldonline.nl)

**Norvegio:** Björn Thuv, I.F. Gjerdrums vei 33 NO-1396 Billingstad  
✉: [bthuv@c2i.net](mailto:bthuv@c2i.net)

**Polando:** Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, ☎: (+ 48 12) 638 14 49

**Rumanio:** Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap. 7. RO-1900 Timisoara

**Rusio:** Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000  
✉: [mirina@online.ru](mailto:mirina@online.ru)

**Svedio:** Bertil Andreasson, Södra Rörm pl. 455, SE-24294 Hörby  
✉: [bertil.andreasson@horby.mail.telia.com](mailto:bertil.andreasson@horby.mail.telia.com)

**Svislando:** Mirelle Grosjean, Temple 20 pt. 9, CH-2416 Les Brenets

✉: [mireille.grosjean@rpn.ch](mailto:mireille.grosjean@rpn.ch)

**Togolando:** Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO,  
✉: [esp.togo@cafe.tg](mailto:esp.togo@cafe.tg)

**Usono:** Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US)  
✉: [72644.2450@compuserve.com](mailto:72644.2450@compuserve.com)

## REPREZENTANTOJ

**Armenio:** Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, AM-375062 Erevan  
✉: [LIDELB@freenet.am](mailto:LIDELB@freenet.am)

**Bosnio kaj Hercegovino:** Nimeta Kulenović, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

**Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, CL-Séptima Región ✉: [strigo@ctcreuna.cl](mailto:strigo@ctcreuna.cl)

**Estonio:** Helgi Hronova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

**Islando:** Loftur Melberg Sigurjónsson, Norðurbraut 33, I.h., IS-220 Hafnarfjörður,  
✉: [loftur@skyrri.is](mailto:loftur@skyrri.is)

**Israelo:** Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv

**Jugoslavio:** Radojica Petrović, Bul. oslobođenja 36, YU-32000 Čačak ✉: [radp@ptt.yu](mailto:radp@ptt.yu)

**Kongo:** Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, CG-Lukala (Bas-Zaïre)

**Korea Resp.:** CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha University, Incheon 402-751, Koreio ✉: [shcho@inha.ac.kr](mailto:shcho@inha.ac.kr)

**Kostariko:** Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José  
✉: [miamiaul@racsa.co.cr](mailto:miamiaul@racsa.co.cr)

**Litovio:** Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius

**Nov-Zelando:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, NZ-Avonside, Christchurch 8004;  
✉: [gddewar@ihug.co.nz](mailto:gddewar@ihug.co.nz)

**Portugalio:** João Jose Santos Rua da Escola, lote 57 - r/c esq Vale Grande, PT-1675 Pontinha

**Slovenio:** Marija Zlatnar-Moc, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana.  
✉: [Marija.Zlatnar@guest.arnes.si](mailto:Marija.Zlatnar@guest.arnes.si)

**Ukrainio:** Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026

**Uzbekistano:** Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taŭkent, CIS  
✉: [egyeny@esper.gimli.com](mailto:egyeny@esper.gimli.com)

**Venezuelo:** Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, VE-Caracas 1071 A